

ESPERANTO

sub la suda kruco

junio 2025





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 32[2] numero 158 junio 2025

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de aŭgusto 2025

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2025 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILLO: *Sandor Horvath sur Kangaru-Insulo.*

Vidu paĝon 5.



ENHAVO

Antaŭparolo	04
Kvintaga piedirado sur Kanguru-Insulo	05
Nov-Zelanda Vortoserĉo	08
IJK 2025	09
Kiun el la 3 personoj vi elektus helpi?	10
Arta argumentado	11
Pensoj pri arto kaj boksado	18
Recenzo: Iam ni trovos hejmon	20
La knabino kun la longa hararo (5)	21
Saneca Salono kun MEA en Torquay	24
Memoroj pri Ralph Harry	25
Pli gravaj problemoj en Wellington	26
Insuloj pelas lingvan diversecon	27
Promenado en bela adelajda kvartalo	28
El la regionoj	31

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

La trian dimanĉon de ĉiu monato, escepte januaron, AEA prezentas retan prelegon. Sandor, la AEA-a prezidanto, jam delonge (2021) organizas tion. Oni povas spekti pasintajn prelegojn en la serio per ligilo sur la retejo de AEA: esperanto.org.au/lecture-series-zoom. Ofte estas pli da eksterlandanoj ol membroj de AEA kaj NZEA kiel spektantaj de la prelegoj.

En februaro Nicole Else (Aŭstralio) prezentis *Televidkvizon pri logika pensado*, interagan sesion kun demandoj por la aŭskultantaro.

En marto Tran Thi Hoan el Vjetnamio kaj Arya Bhaskara Ferduzi el Indonezio prezentis pri *Azio kaj Oceanio kune dum la IJK 2025 en Indonezio*. La 81a Internacia Junulara Kongreso okazos inter la 9a kaj 16a de aŭgusto en Cisarua (Bogota) Indonezio. Vizitu la retejon de TEJO ijk2025.tejo.org/novajoj por plu esplori. Jam manpleno de ESK-anoj aliĝis al la IJK

kaj ni atendas raportojn postajn por ESK.

En aprilo Jonathan Cooper prelegis kun titolo *Arto estas kiel boksado*. Pro longa kariero kun ŝtata artgalerio en Aŭstralio, Jonathan inde kaj informe prezentis pri artotemoj. Rigardu je youtu.be/9Pkjeqm3uqU.

En majo Moisés Herrera Barrera el Kolombio prezentos. (Jam pasinta kiam vi legos ĉi tiun, sed je la dato de skribo ne ankoraŭ okazis). Moisés instruos ĉe la AEA-NZEA-a somerkursaro en Aŭklando en januaro 2026, do la prelego estas bona oportuno por enkonduki lin al ĉeestontoj. Se vi mistrafis la prelegon je la 18a de majo, rigardu ĝin pere de YouTube: esperanto.org.au/eo/prelegserio-zoom.

Do nepre rigardu la estontajn prelegojn en la longdaŭra serio. Dimanĉe 17.00 (EST) 15an de junio, 20an de julio kaj 17an de aŭgusto. Kaj ĉiun trian dimanĉon de la monato poste. Ricevu la ligilon per prezidanto@esperanto.org.au. 



Sandor Horvath sur Kangaru-Insulo: Vidu la artikolon, kontraŭe

Kvintaga piedirado sur Kanguru-Insulo

SANDOR HORVATH (ADELAJDO)

Post Pasko, mia kunulino Helen, ŝia frato Davis kaj lia kunulino Dana piediradis laŭ la "Kanguru-Insula Sovaĝa Pado" (Kangaroo Island Wilderness Trail).

Kanguru-Insulo estas la tria plej granda insulo apud Aŭstralio (post Tasmanio kaj Insulo Melville). La loĝantaro estas proksimume 5 000 kaj la insulo estas fama pro sia natura beleco kaj diversa faŭno.

Karta Pintingga — kiu signifas "Insulo de la mortintoj" — estas la indiĝena nomo de Kanguru-Insulo. Ne ekzistas indiĝena terenrajto sur Kanguru-Insulo. Homoj de la nacioj Ramindjeri, Ngarrindjeri, Kaurna, Nharangga kaj Barngalla laŭsupoze loĝis en ĉi tiu areo antaŭ proksimume 16 000 jaroj, antaŭ ol la altiĝanta marnivelo kaŭzis ĝian apartigon de la kontinento de Aŭstralio.

En januaro 2020 gravaj fajroj detruis kaj forbruligis grandan parton de la okcidenta parto de la insulo.

Jam delonge ni intencis marŝi laŭ tiu pado kaj ni volis ankaŭ eltrovi kiel la tero,

la plantoj kaj la bestoj resaniĝis post tiu natura (homfarita?) katastrofo. Ĝenerale, sufiĉe bone.

Jam pasis pli ol unu jaro ekde nia lasta simila aventuro (en Nacia Parko Kakadu), do ni estis iomete anksiaj, ĉu ni fizike kapablus.

Estas 70 km longa pado en la sud-okcidenta angulo de la insulo.

La kosto de la promenado estis po 206 dolaroj por unu persono. Tute en ordo, ĉar la pado estas bone desegnita, bone markita kaj la tendejoj estas altkvalitaj: puraj necesejoj, fluanta akvo en la kovrita kuirejo, tendejoj sur lignaj platformoj, kaj eĉ ŝrankoj por protekti vian manĝaĵon kontraŭ diversaj bestoj dum la nokto.

Kompreneble mi iom luktis: ne ofte mi portas 17 kg sur mia dorso dum kvin tagoj, sed mia sento post la ĉiutaga alveno al la tendumejo estis tre eŭforia.

Jes, ni ankaŭ vidis multajn ludantajn fokojn, ehidnojn, diversajn birdojn,

Daŭras >





serpentojn kaj, kompreneble, kelkajn koalojn.

Surprize, la koaloj travivis la arbarajn incendiojn de 2020 en multe pli grandaj nombroj ol oni komence timis. Se la pliigitaj nombroj ne estos pritrakitaj, ili formanĝos sian manĝaĵon. La logika solvo estus forigi ilin, sed politike tio simple ne eblas.

Dum nia kvintaga promenado ni spertis la ŝanĝiĝantajn etosojn de la maro kaj la ĉielo, la muĝadon de la Suda Oceano kaj la ondojn frakasiĝantajn kontraŭ altaj klifoj

sur malproksimaj strandoj.

Ne estis konekto al poŝtelefono kaj nia ĉiutaga vivo estis tre simpla. Ĝi estis bona okazo por replenigi niajn spiritojn kaj restarigi kaj revigligi niajn animojn. Kaj ĝi remetis nin en nian “veran lokon”: La lokon, kie la naturo estas granda kaj ni estas malgrandaj.

Konsideru viziton al Kangaru-Insulo kaj konsideru tiun kvintagan piediradon. 





Nov-Zelanda Vortoserĉo

VICKY CRICKETT (TAURANGA, N-Z)

La ceteraj literoj malkovros la nomon de konata loko en Nov-Zelando.

Jen la vortoj
por trovi:


AĜO
AMI
AMIKO
ASOCIO
BANKO
BAZO
BOLI
ĈAR
ĈIES
ĈU
DUM
EDZO
ERARO
FOJO
FOR
FOSI
GASO
IAL
IEL
IES
IMAGI
IOM
JAKO
JEN
KIA
KIU

KVANTO
LAŬ
LIBRO
LUMI
NEK
NORDO
PECO

PENI
PER
PLI
PLU
PLUS
PRINTEMPO
SALO

SEN
TEO
TIA
TIAL
TIE
TIES
TONDI

TRA
TRAKTI
TRO
UZI
VEKI



(Solve in the
next number)

IJK 2025: eskapu aŭstralian vintron al la varmaj brakumoj de samideanoj

ALBERT STALIN GARRIDO (FILIPINOJ/HISPANIO)

Multaj homoj en la Esperanto-movado, ĉefe tiuj en la norda hemisfero, pensas pri aŭgusto kaj kiel pasigi sian someron kaj refreŝiĝi meze de la varmego. En Aŭstralio, tamen, estas alia rakonto, kiun homoj de aliaj landoj ofte forgesas: tiam estos vintro tie. Tamen, malgraŭ la hemisferaj kaj sezonaj diferencoj, la celo estas la sama: portempe eskapi de loko, kie la klimato estas ekstrema, kaj portempe rifuĝi tien, kie estas pli agreble.

Por multaj aŭstralianoj, eble Indonezio estas inter la unuaj lokoj, kiu venas enmensa. Preskaŭ superfluas diri, ke Balio estas populara inter tiuj, kiuj deziras, sen iri tro malproksimen, ĝui refreŝigan tropikan etoson kaj la brilon de la sunlumo sur belaj pejzaĝoj kun kulturaj mirindaĵoj. Tamen, ĉi-foje, ni invitas vin al Indonezio por tute malsama kialo.

Venu al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio. IJK estas la ĉefa jara evento de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Atentu, ĉar malgraŭ la nomo "Junulara", oni neniam

estas tro maljuna por ĉeesti la kongreson, ĉar IJK, en sia plena historio, ĉiam estas malfermita al homoj de ĉiuj aĝoj, kontinentoj, kaj lingvoniveletoj.

Ni kongresos en Alfa Resort Hotel & Conference en la urbeto Cisarua (Bogor), ĉirkaŭ 75 kilometrojn sude de la ĉefurbo Ĝakarto sur la insulo Javo. Kune, ni troviĝos inter neaktivaj vulkanoj,

kiuj donos al ni impresan pejzaĝon kaj kie la klimato estos milda, ĝuigante al ni tropikan etoson sen la malagrablaj varmegaj temperaturoj. Dum la semajno ni komforte loĝos kontraŭ malaltaj prezoj, kiuj jam inkluzivas ĉiujn manĝojn.

Per la kongresa temo "Diverseco, solidareco, kaj toleremo," ni kune esploros la kulturan kaj lingvan diversecon de Sudorienta Azio, meditos pri la defioj de tiu diverseco, kaj pensos pri konkretaj kaj daŭripovaj solvoj per kunlaboro inter homoj de malsamaj landoj kaj generacioj. En la taga programo vi spertos ankaŭ vastan gamon de kulturaj, lernigaj, sportaj, kaj distraj programeroj. Vespere, vi gustumos la mondon dum la Trinkomanĝa Nokto kaj aŭskultos la talenton de lokaj kaj internaciaj artistoj



CISARUA 2025



dum la Internacia Vespero kaj niaj koncertoj. Nokte, dancu, trinku teon, aŭ kantu en nia karaokejo, laŭ via plaĉo. Kompreneble, vi mem povas kontribui al la programo!

Antaŭ, dum, kaj post IJK okazos ekskursoj, kiuj malkovros al vi diversajn aspektojn de Indonezio, ĉu trankvile, ĉu aventure. Atendas vin antaŭkongresaj ekskursoj, nome, trankvila vespera promenado tra Ĝakarto kaj vizito al la

regiona ĉefurbo, Bogor, inter orkidacoj kaj folioj. Post IJK, spertu kunvivi kun indiĝenaj popolanoj de "Baduy Luar" kaj poste plonĝu en belega maro ĉirkaŭ Pulau Seribu ("Mil Insuloj") en niaj postkongresaj ekskursoj.

Se vi ŝatus malkovri pli da Sudorienta Azio, kial ne aldoni plian landon al via itinero: eble, Filipinoj? Profitu de la okazo, ĉar unu semajnon post IJK okazos plia postkongresa ekskurso en Manilo plus la 2-a Filipina Junulara Renkontiĝo (FAJRO), okazonta de la 22-a ĝis la 24-a de aŭgusto en la marborda urbeto Lian (Batangas). En nia unua vera internacia evento, konatiĝu kun junaj filipinanoj kaj malkovru la belecon de la "perlo de la oriento." Atentu, ĉar pli da informo baldaŭ aperos ĉe esperanto-ph.org. 

Kiun el la 3 personoj vi elektus helpi?

NICOLE ELSE (SIDNEJO) – Tradukita el la angla

Viro estis petita solvi la sekvan moralan problemon. Kiel vi estus respondinta tiun demandon? Kiu laŭ vi estas la plej bona respondo? Ĉu eblas doni originalan respondon?

Vi stiras vian aŭton dum pluvega, ventega, malvarmega vespero. Vi preterpasas bushaltejon kie atendas 3 personoj:

1. Maljunulino, kiu aspektas ege malforta, malsana
2. Malnova amiko de vi kiu antaŭ pluraj jaroj savis vian vivon
3. Bela virino kiu similas al la perfekta virino de viaj sonĝoj.

Kiun el la tri personoj vi elektos helpi

sciante, ke estas spaco por nur unu persono en via aŭto?

Pripensu iomete, kiun personon vi elektus? Kiel vi respondus tian demandon?

Eble vi elektos la maljunulinon, ĉar ŝi eble mortos se ŝi malvarmumos estante tre malforta. Aŭ vi povus elekti la malnovan amikon, ĉar li ja savis al vi la vivon kaj do tiu ĉi estas bonega okazo por danki lin. Sed se vi elektas unu el tiuj du eble vi neniam plu revidos tiun belulinon kaj perdos la eblecon konatiĝi kun ŝi.

Jen bonega respondo:

"Mi simple donus la ŝlosilojn de la aŭto al mia malnova amiko kaj petus lin konduki la maljunulinon al kuracisto. Mi restus ĉe la bushaltejo kun la belulino." 

Arto argumentado

JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

(Bazita sur AEA-prelego per Zoom, *Arto estas kiel boksado*, la 20an de aprilo 2025)

Polemiko en arto ne estas nova fenomeno; ĝi jam okazis dum la Renesanco. Ĉi tiu artikolo ekzamenas kelkajn el la temoj pri kiuj artistoj malkonsentis kaj argumentis dum la pasintaj 550 jaroj, kaj pere de tio, vi espereble lernos kelkajn interesajn aferojn pri arto. Multaj ekzemploj estas en la kolekto de la Art Gallery of New South Wales (AGNSW), kie mi laboris dum pli ol 30 jaroj.

Rigardu la pentraĵon *Printempa frosto* de la aŭstralia artisto, Elioth Gruner (Bildo 1). Tio verŝajne estas la plej populara artaĵo en la kolekto de la AGNSW, laŭ oftaj vizitantoj. Kial? Nu, ĝi montras lertan iluzion de reala vidaĵo; ĝi komunikas la senton kaj memoron de frosto, la koloroj estas harmoniaj, kaj ĝi havas bone ordigitan komponadon. Resume, ĝi estas bela kaj ne malfacile komprenebla.

Sed, ĉiu pozitiva komento povas havi negativan kontraŭpunkton. Imagu ke vi estas art-kritikisto kaj vi volas paroli kontraŭ tiu pentraĵo, eble por montri, ke vi havas aprezon de arto malpli naivan ol "ordinaraj" homoj.



1. Elioth Gruner, *Printempa frosto* 1919



2. Edgar Degas, *Dancistino rigardante la plandon de la dekstra piedo* 1900–10



3. Ivan McMeekin, *Te-bovlo* ĉ.1956

Iu povas diri: "La pentraĵo montras lertan iluzion de reala vidaĵo." Tamen, al tio oni povas respondi: "Ĝi estas nur trompaĵo; la artisto estas sklavo al la principoj de perspektivo."

"Ĝi memorigas min pri la sento de frosto." Aŭ... "Ĝi estas sentimentala."

"La koloroj estas harmoniaj kaj ĝi havas bone ordigitan komponadon." Aŭ... "Ĝi estas ne sufiĉe provoka, eĉ enuiga."

Interese, niaj reagoj al arto malkaŝas aferojn pri ni mem, precipe niajn atendojn.

Rigardu la skulptaĵon faritan de la fama impresionisma pentristo, Edgar Degas (Bildo 2). Kiajn riproĉojn oni povus fari?

Daŭras >



4. Sir Luke Fildes, *La vidvo* 1875–76

Eble, “Ĝi estas tro ordinara.” Tiukaze, la atendo estus: “Arto devus esti pli interesa ol ĉiutaga vivo.”

Eble, “Ĝi estas tro malglata.” La atendo estus: “Arto devus esti rafinita.”

(Interese, homoj kutime akceptas krudecon en pentraĵoj pli ol en skulptaĵoj.)

Rigardu la ceramikaĵon de Ivan McMeekin (Bildo 3). Neniu havus problemon pri tio kiel utila objekto, kaj multaj eĉ priskribus ĝin kiel “bela”, sed ĉu ĝi estas “arto”? (Nu, ĝi estas en la kolekto de AGNSW, do ĝi devus esti, ĉu ne?)

Do, unu riproĉo povus esti: “Ĝi ne estas artaĵo, sed metiaĵo.” Kaj la atendo estus: “Arto originala (kreita kiel nova formo) estas pli bona ol metio (rekreita de jam ekzistanta formo).” Krome, “Arto devus esti nur por rigardi, ne por uzi.”



5. Laurens Craen, *Ajbildo*¹ kun imaga vido c1645–50

Ni revenu al la pentraĵo, per kiu ni komenciĝis (Bildo 1). Tio nun ŝajnas al ni tre “tradicia”, ĉu ne? Tamen, ĝi iam al iuj estus neakceptebla. Ekzemple, imagu ke ĝi estus rigardata de la pentristo de *La vidvo*, la Viktorina angla artisto, Luke Fildes (Bildo 4).

Kion Fildes dirus? Eble, “Ĝi estas ne edifanta; ĝi ne faros iun pli bona, morale. Ĝi estas nur bildo de iuj bovinoj.” Nun imagu ke *Printempa frosto* estus rigardata de la pentristo de la aĵbildo¹ en Bildo 5, la 17a-jarcenta nederlanda pentristo, Laurens Craen.

Lia plendo pri la pentraĵo de Elioth Gruner verŝajne estus pli pri tekniko ol temo: “La peniko-strekoj estas tro evidentaj; estas ne sufiĉe da detaloj.”

Do, argumentoj pri arto ne estas nur inter artistoj kaj kritikistoj (aŭ inter artistoj kaj la publiko) sed ankaŭ inter artistoj kaj artistoj.

Bataloj en arto tra historio

Ek de la Renesanco, okazis bataloj inter artistoj pri tio, kion signifas bona arto. Ili estas pri la temoj de arto, kaj kiel arto traktas ilin.



6. Rafaelo, *Mond' Krucumado* 1503



7. Matthias Grünewald, *Retablo de Isenheim* 1515



8. Parmigianino, *Madono kun la longa kolo* 1534–35

Rigardu la pentraĵon en Bildo 6, de la fama itala renesanca artisto, Rafaelo. Kiel la krucumado de Jesuo estas traktita? Kiel perfekta, kvietita evento, malgraŭ la temo de morto kaj ofero. Ekzemple, rigardu la simetrian, la ripetadon de kurboj kaj duoncirkloj, kaj kiel la du anĝeloj kolektas la sangon de Jesuo en tasojn.

Nun, rigardu la retablo-pentraĵon en Bildo 7. Ĝi havas la saman temon kiel tiu de Rafaelo, kaj estis pentrita proksimume la saman tempon (sed en Germanio). Kiel la temo estas traktita tie? Kiel tragika, malperfekta evento. La korpo de Jesuo eĉ



9. Antoine Watteau, *La enŝipiĝado al Citero* 1717

montras simptomojn de la pesto, kiu farus ĝin pli rilatebla al samtempaj rigardantoj

Reen al Italio, sed iom pli poste: rigardu la pentraĵon en Bildo 8. La temo ne estas la krucumado, sed Jesuo kiel bebo, kaj lia patrino. La temo estas traktita tre strange. La komponado estas malekvilibra kaj la figuroj estas distorditaj. La artstilo estis iam konata kiel la "Malfrua Renesanco", tamen nun oni nomas ĝin "Manierismo". Tiamaj artistoj sentas ke la verkaro de artistoj de la Alta Renesanco – ĉefe Leonardo, Rafaelo, Mikelanĝelo kaj Botičelo – estis tiel perfekta kiel arto povas esti. Do, ĉar ne eblas iĝi "pli perfekta", ili volas ke arto almenaŭ estu pli interesa.

Nun ni iras al frua 18a-jarcenta Francio kaj la verko de Antoine Watteau (Bildo 9). La temo estas imaga evento: riĉuloj preparas iri al la insulo de Citero (kie la diino Venuso supozeble naskiĝis). La celo de arto por Watteau estis esti kiel komforta sofo, do li kreis bildon dolĉan kaj malpezan.

Bildo 10 montras pentraĵon de la malfrua 18a-jarcenta franco, Jacques-Louis David. Tri fratoj de romia familio, la Horacioj, konsentis fini militon, batalante tri fratojn de familio de la malamiko. La tri fratoj pretas oferi siajn vivojn por la bono de Romio. La celo de arto por David

Daŭras >



10. Jacques-Louis David, *Ĵuro de la Horacioj* 1784



11. Francisco Goya, *La tria de majo* 1808, 1814

estis inspiri, kaj instigi la rigardanton fari heroajn agojn, do li kreis bildon heroan, solenan, kaj "pezan".

Alian pentraĵon kun la temo de milito oni vidos en Bildo 11. La artisto Goya festis la hispanan reziston al la armeoj



12. Caspar David Friedrich, *Vaganto super la maro de nebulo* 1818



13. Edgar Degas, *La drinkanto de absinto* 1876

de Napoleono dum la okupo de Madrido. Laŭ li, milito estas sensenca, ne heroa afero. Ĝi certe ne estas glorinda.

La germana romantikista artisto, Caspar David Friedrich, pentris la vidaĵon en Bildo 12, kiu gloras la majeston de la naturo. La celo de tiu arto estis, kiel por David, inspiri, tamen ne al milita aŭ politika ago, sed al miro, aŭ eĉ solena timo.

En Bildo 13 vi vidos fruan priskribon de moderna vivo. Edgar Degas, la pentristo (kaj skulptisto) konata pro siaj prezentaĵoj de baletistinoj, prezentas al ni drinkanton de absinto kaj ŝian kunulon. La temo estas la tedeco de moderna, ĉiutaga vivo. Rigardu kiel Degas ŝajnigas ke li hazarde kaptis tiun scenon, kvazaŭ per moderna fotilo. Tamen la komponado – kun siaj



14. Claude Monet, *La stacidomo Sankta Lazare* 1877



15. Thomas Gainsborough, *Gesinjoroj*
Andrews ĉ.1750, kaj Honoré Daumier, *La triaklasa vagono* c.1862–64

zigzagaj, oblikvaj linioj – estas tre lerta, kaj tute ne hazarda.

Modernan vivon montris ankaŭ Claude Monet, en *La stacidomo Sankta Lazare* (Bildo 14). Tamen, tiuokaze, la grandaj, siblaj, potencaj lokomotivoj, kaj la nuboj de vaporo, estas simboloj de ekscita, nova mondo.

Ni vidis plurajn ekzemplojn en kiuj



16. Leonardo da Vinci, *La Lasta Vespermanĝo* 1495–98, kaj Tintoretto, *La Lasta Vespermanĝo* 1592–94



17. Jackson Pollock pentrante

artistoj montras malsamajn respondojn al la demandoj, “Por kio estas arto?” kaj “Kion signifas bona arto?” Jen kelkaj aliaj:

Bildo 15: Ĉu arto estu por, kaj pri, riĉuloj aŭ pri malriĉuloj?

Bildo 16: Ĉu komponado estu trankvila aŭ dinamika?

Alia loko de la argumento estas la rilato inter la artisto kaj la kreado de sia verko.

La supozita maniero por pentristo labori estas ĉe vertikala, plata, streĉita rektangula surfaco (sur stablo), rigardante la temon, pentrante per peniko kaj artistita oleofarbo sur paletro.

Tamen, rigardu kiel la usona artisto, Jackson Pollock pentris (Bildo 17): super horizontala, nestreĉita surfaco, li metis la farbon verŝante, gutetante, frapante. Li estis “en” la pentraĵo, kaj ne rigardis aliloken. Fakte, la procezo de kreado estis la temo de la pentraĵo.

Hans Hoffman, pli maljuna artisto kaj mentoro de Pollock unufoje vizitis Pollock en lia ateliero. Li diris al la pli juna artisto: “Jackson, vi ne desegnas el la naturo. Ne estas bone; vi ripetos vin mem.” La respondo de Pollock estis: “Mi estas la naturo!”

Supozita maniero de skulptista laboro estas ĉizi solidan materialon (ŝtonon aŭ lignon), agnoskante graviton. Do, skulptaĵoj estas plej ofte pli-malpli solidaj,

Daŭras >



18. Richard Deacon, *Aŭskultante racion* 1986
sidantaj sur soklo, sur bazo (kiu apartigas la artaĵojn de la planko kaj, tial, la “reala” mondo).

Tamen, la skulptaĵo en Bildo 18 estas malfermita (oni povas trairi ĝin). Ĝi sidas rekte sur la planko, kaj ĝi estas konstruita el lamenigita ligno, kiu kreis malglatan



19. Ken Unsworth, *Pendigita ŝtona cirklo II* 1974–77

surfacon, ĉar la gluo estas ankoraŭ videbla. Tamen, la skulptaĵo ankoraŭ estas objekto sidanta sur horizontala surfaco (la planko).

Aliflanke, la skulptaĵo en Bildo 19 (eble la plej populara nuntempa verko de AGNSW) ŝajnas defii graviton. Ĝi ne plu estas objekto kiu sidas, aŭ kuŝas, sur la planko, sed pendas de la muroj.

Artan argumentadon oni povas kompari al ia boksa matĉo. Imagu, ke la pentraĵoj en Bildoj 20 kaj 21 estas boksistoj, kiuj batalas unu la

alian. Mi estos la anoncisto:

“Gesinjoroj! El via ŝtata artgalerio, ni prezentas al vi la ĉefan batalon por hodiaŭ, inter Kavaliro Ed Poynter kaj Vic Pasmore. Ni estas ĉe la kadro-flanko, kaj mi prezentu al vi la du pentristojn: [Bildo 20] Kavaliron Edward Poynter, surhavantan multkoloran ŝorton, kaj lian kontraŭulon, [Bildo 21] surhavantan brunan kaj blankan ŝorton: Victor Pasmore.

[20] Kavaliro Edward praktikis arton dum multaj jaroj, sed lia trejniĝo en la prestiĝa Brita Akademio, kaj lia fajna tekniko, konservis lian popularecon. [21] Victor Pasmore estas pli lastatempa aldono al la artgalerio, sed li allogis sufiĉe aprobantan spektantaron inter la amantoj de abstrakta arto.

La arbitraciisto nun parolas al ĉiu pentristo: li kontrolas la paletrojn por iliaj blankoj, kaj avertas pri nebuligado sub la glazuroj. Ili nun revenas al siaj stabloj... kaj atendas la sonorilon.

🔔 [21] La malgrandeco de la pentraĵo de Pasmore permesas al li labori rapide de sia angulo, [20] sed Poynter kontraŭas per sia pli larĝa gamo da koloro – rigardu



20. Sir Edward John Poynter, *La vizito de la Reĝino de Ŝebao al reĝo Salomono* 1881–90

tiujn ruĝojn kaj orojn, kaj ruĝojn kaj orojn. Tiuj certe estas rapidaj ŝanĝoj de koloro!

[21] Sed la simpla konstruado de Pasmore, kun apenaŭ ajna kolorŝanĝo, ŝajnis la stilon de Poynter peza kaj peniga.

[20] Nun Poynter forte batas per siaj markaroj² kaj tuŝaspektoj³: rigardu la marmoron kaj la paralelajn sulkojn sur la kolonoj!

[21] Pasmore rebatas per siaj fortaj, akraj rektanguloj. Li entute apenaŭ ŝajnas moviĝi!

Nu, du povas tiel ludi: [20] Poynter kreas lerte kaŝitajn rektangulojn en la fono. Li zigzagis ĉie en la kanvaso, uzante multe pli da spaco ol Pasmore.

[21] Sed Pasmore funkcias bone en malgranda areo: li nur milde premas antaŭen; li apenaŭ ŝajnas esti tuŝita de la atako de Poynter.

[20] Sed nun Poynter alportas en la ludon sian temon: Estas enorma pliigo de religia sento dum li citas el la Biblio kaj – malgraŭ tiu afero de religio – estas pli ol malgranda kvanto da seksallogo por la spektantaro: brako, kruro, kapo, mamoj! Kia spektaklo! Kiel Pasmore povos

venki tion?

[21] Nu, Pasmore rebatalas per glataj surfacoj kaj simpla geometrio. Estas sento, ke io tre grava okazas ĉi tie; li rekte alvokas la sciencan kaj matematikan modon de la 1950aj jaroj. Kia atako kontraŭ malprofunda rakontado! Li tute ignoras la mondon!

Pasmore enmetas rektajn liniojn. [20] Poynter kontraŭas per rektaj linioj. [21] Heleco de Pasmore, [20] profundaj ombroj de Poynter. [21] Malgrandaj, rektangulaj blokoj de Pasmore, [20] la profunda iluzio de spaco de Poynter.

[21] Sed kion Pasmore nun faras? Kia nekutima taktiko! Li nur staras tie, prelegante al Poynter pri komponado kaj geometrio! Kia kuraĝo! Kia eltenemo! [20] Nu, Poynter ne permesos, ke li sukcesu pri tio! Li prelegas al Pasmore pri desegnado de la korpo, kaj anatomio. Apenaŭ estas muskolo eksterloke, eĉ en la plej malfacilaj pozoj.

Ho! Nun estas forta movado dekstren de Poynter, [21] kontraŭata de ekvilibra aranĝo de Pasmore! Ambaŭ tiuj artistoj scias pri kio signifas bona pentraĵo, sed tia malsameco de stiloj...🔔🔔... kaj jen la sonorilo pri la fino de raŭndo unu."

Resumo

- Niaj reagoj al arto malkaŝas aferojn pri ni mem, precipe niajn atendojn
- Bona maniero por pli bone aprezi arton estas imagi ke artistoj de du artaĵoj, kiujn vi rigardas, parolas unu al la alia pri arto: Ĉu ili interkonsentos aŭ ne?
- Alia bona maniero estas trovi artaĵon, kiun vi ne ŝatas: imagi ke vi estas nova laboristo ĉe komerca galerio; iu eniras la galerion – penu vendi tiun artaĵon!



21. Victor Pasmore, *Reliefkonstruo en blanko, nigro, kaŝtankoloro kaj okro* 1961

Iuj difinoj

1. **Ajbildo:** bildo prezentanta aranĝon de senvivaj objektoj (aĵoj), ekz-e fruktoj, floroj, bovoj, ktp.

2. **Markaro:** dezajno per kiu linioj, formoj, aŭ koloroj estas ripetitaj en regula aŭ neregula maniero (angle, "pattern")

3. **Tuŝaspekto:** la aspekto kaj sento de surfaco (angle, "texture") – Pluraj esperantistoj sugestis al mi la vorton "teksturo", tamen "tuŝaspekto" priskribas la koncepton, kiun mi volas komuniki. Interese, la ankoraŭ ne publikigita PIV inkluzivos ankaŭ tiun signifon.

Por vidi la artaĵojn pli detale, vizitu la retpaĝon doctordada.com/eo/arta-argumentado. 

Pensoj pri arto kaj boksado

TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

En aprilo la AEA-a prelego por tiu monato estis prezentita de Jonathan Cooper kun titolo instiganta scivolemon "Arto kaj Boksado". Kian rilaton Arto povus havi kun boksado? mi pensis. Kiel kutime la prelego estis kaj bonkvalita kaj informa.

En parto de la prelego Jonathan provis pensigi nin pri kio estas arto? Li

prezentis per multaj ekzemploj de artaĵoj el la Artgalerio de Nova Sudkimrio, la diversecon de tiuj artaĵoj kaj kiel iuj artistoj strebas preteriri la limojn de la akceptita difino de arto.

Unu difino kiun li ne menciis estis, ke arto estas la kariero kiun viaj gepatroj rekomendas ke vi ne sekvu. Se junulo



dirus al siaj gepatroj, "Mi deziras esti artisto!", ili respondus, "Ho jes, sed unue vi sekvu realan karieron kaj vi iam flanke povos artumi." Eble ne ĉiuj gepatroj tion dirus, sed preskaŭ! Mi opinias, ke la samo okazas pri verkado kaj poezio – aliaj artoj. Kial?

En plej multaj laboroj, almenaŭ en Aŭstralio, ekzistas "baza enspezo", kiun la registaro postulas dunginto pagu al dungito. Entreprenistoj devas iel trovi rimedojn por sufiĉe enspezi. Jonathan iomete pritraktis la monvaloron de artaĵoj kaj evidentiĝas, ke iuj artaĵoj iĝas valoregaj (kaj multaj el tiuj pendas aŭ staras en ŝtatgalerioj). Sed por la plej multaj artistoj ties artaĵoj restas senvaloraj aŭ preskaŭ tiel. Kiuj decidas, kio valoras kaj kio ne valoras? Ĉu la ĉefministro, kiu aprobis la aĉeton de *Bluaj fostoj*, pentrita de Jackson Pollock?

Ŝajnas ege malegale, ke iuj artistoj post multe da laboro ricevas nenion kaj iuj post ne multe riĉiĝas. Ĉu nur pro mallerteco? Jonathan menciis, ke iuj artaĵoj pro rareco gajnas valoron same kiel objektoj, kiuj havas ian raran kvaliton. Sed ne nur pro tio ili iĝas valoraj. La merkato ankaŭ influas aŭ regas tion. "Ofertado kaj mendado" estas manipolataj pere de la merkato. Iuj markoj de ŝuoj estas nepre bezonataj de junuloj. Kaj iuj artaĵoj valoraj laŭ artvendistoj. Tiuj konvinkantoj venkas. Kaj la cetero malvenkas.

Jonathan mallonge tuŝis temon, ĉu metiaĵo estas artaĵo? Pro tio, ke tiuj metiaĵoj estas ofte ripetaĵoj, oni konsideras ke ili ne estas artaĵoj. Sed ĉu ne artistoj ekspluatas stilon, kiun ili evoluigas kaj ripete produktas similajn pentraĵojn laŭ tiu stilo, aŭ presas kopiojn de siaj artaĵoj por vendi? Pri tiu temo mi apogas la artaĵojn de metiistoj, ĉar mi iam, dum kelkaj jaroj, provis enspezi per metio. Kiam mi loĝis kun Alan Turvey

en Redfern mi komencis iri al la bazaro ĉe Glebe kaj vendi ledaĵojn kaj plumojn. Kaj mi konstatis, ke estas vere malfacile vivteni per metiado. Mi devas konfesi, ke mi ne estas vendisto. Mi ŝatas fabriki sed ne ŝatas vendi. Ĉu eble tio estas la kerno de la afero? Artisto devas vendi sin mem kaj tio estas iel kontraŭ la filozofio de arto mem, ĉu ne?

Jonathan fine de la prezentado kreis scenejon kie du pentraĵoj kvazaŭ boksas unu kontraŭ la alia por akiri poentojn. La venkinton li ne nomis. Ĉu eble li lasis tiun decidon al la spektantaro? Mi ial atendis, ke li menciis artiston Vincent Fantauzzo de Melburno. Pro disleksio Vincent ne profitis lerni en la publika lernejo. La instruistoj taksis lin mallaborema, kaj neniel helpis lin. Kun risko enkarcerigi (li ja leĝojn malobeis) li iris al boksejo, kie li komencis lerni tiun arton. La trejnanto konsilis lin, ke li estas pli bona portreta artisto ol boksisto kaj pagis lin por pentraĵo de du famaj boksistoj. En 2008 Vincent pentris portreton de Heath Ledger kaj ĝi estis la populara elekto en la artpremio Archibald. Li gajnis tiun honoron kvarfoje, la plej ofta gajninto. Krom fari arton, nuntempe Vincent private praktikas boksadon kun elita grupeto.

Jen Arto kaj Boksado! **E**



Vincent Fantauzzo kaj sia pentraĵo, *Heath* 2007

Recenzo: *Iam ni trovos hejmon,* de Trevor Steele

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Ĉi tiu libro, eldonita en 2023, temas pri du rifuĝintoj: Musa estas juna viro de Afganio sed membro de subpremata etna grupo en lando de taliboj. Zaina estas juna rohinĝa virino, membro de islama etna grupo kiu spertas perfortan persekuton en Mjanmao (Birmo).

Musa kaj Zaina devas fuĝi el siaj landoj. Per boato el Indonezio ili celas Aŭstralion por peti azilon. Ili kredas ke bonkoruloj afable bonvenigos kaj helpos ilin. Tamen, post atingi Kristnaskan Insulon, ili trovas nur ŝtonvizaĝajn burokratojn de la enmigra fako de Kanbero. Musa estas sendita al koncentrejo en la insulo Manus en Papu-Nov-Gvineo. Zaina estas sendita, kun ŝia infano, al la eta insulo Nauro apud la ekvatoro.

Poste oni translokigas Musa kaj Zania al homtenejo en Okcidenta Aŭstralio kie ili konatiĝas kaj, ne surprize, enamiĝas. Tamen, ĉu ili trovos decan hejmon en Aŭstralio? Vi devos legi la libron por scii kio okazas!

Kiel ĉiam, la libro estas verkita en


facile legebla Trevor-a stilo. Kio plej impresis min, tio estis detaloj pri la mizera ĉiutaga vivo de azilpetantoj en Manus kaj Nauro: privomindaj manĝaĵoj, eterna enuado, aĉaj vivcirkonstancoj en tendoj kaj konteneroj, altaj temperaturoj kaj humideco, suicidprovoj, minacoj de seksa perforto, kaj anarĥio inter homamaso de rifuĝintoj de diversaj landoj kaj malsamaj lingvoj. La vivo devas esti ege mizera kun

jaroj da atendado kaj dolora seniluziigo post malkoheraj decidoj de aŭstraliaj oficistoj.

Mi rekomendas ĉi tiun libron pro la temo. Mi preferas legi spionromanojn ktp kaj mi ne emas legi pri azilpetantoj. Dank' al ĉi tiu libro mi nun komprenas pli pri la kruela persekutado de etnaj grupoj en aliaj landoj kaj la fakto ke multaj homoj (kaj kelkaj estas lertaj homoj, ekzemple kuracistoj) nur serĉas sekuran hejmon por siaj

familioj kaj ŝancon por kontribui al societo en demokrata lando.

Mi aĉetis la bitlibron ĉe la retbutiko de la Flandra Esperanto-Ligo kaj mi sukcesis legi ĝin pere de Kindle. 📖



Elĉerpaĵo 5 el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: En 2023, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligan al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.

Budapeŝta geto

La Budapeŝta geto establiĝis. Por mallonga tempo, mi ne devis iri al la geto ĉar mia edzo laboris en la Deviga Laborejo. Tamen tiel ne daŭris longe. Kiam mia edzo foriris al tiu laboro, nia pordisto promesis, ke li kaj lia familio prizorgos min. Kiam mi memorigis lin pri tiu promeso, li respondis ke la germanoj observas lin kaj li timis, ne nur por si mem, sed por sia edzino kaj tri adoleskaj infanoj.

Niaj telefonoj estis malkonektitaj, oni konfiskis nian radioaparaton, nenia ĵurnalo atingis nin, ni izoliĝis de la ekstera mondo. Kompreneble ni scivolis kio okazas. Ĉar mi komprenis iom de la angla kaj sopiris scii pri la nuna situacio, estis memklare ke mi devas trovi rimedon por aŭskulti la BBC-an novaĵon el Anglio. Mi petis al la pordisto permesi min foriri de la konstruaĵo, ĉar mi deziris viziti geamikojn por aŭskulti la novaĵon sur la radio. Ĉar ankaŭ li deziris scii la novaĵon, li nevole permesis min eliri. Mi renversis mian jaketon, por kaŝi la flavan stelon, eliris la "Judan Domon" (tiel nomiĝis nia domo) kaj malrapide promenis al la domo de niaj geamikoj proksima al Keleti pályaŭdvar stacidomo, je distanco de dudek minuta

promeno. Mi sciis ke mi riskis la vivon, ne nur ĉar mi forlasis la "Judan Domon", sed ĉar mi aŭskultas la "radion de la malamiko"; sed mi ankoraŭ ne spertis tian timon! Mi sentis min kuraĝa pro la deziro trovi iom da espero por niaj malbenitaj vivcirkonstancoj. Kompreneble estis avantaĝo, ke mi ne aspektis jude. Kiam miaj presbiteraj geamikoj malfermis la pordon, ili tute silentis, rapide entiris min kaj eĉ ofertis al mi frandaĵojn.

Mi aŭskultis la novaĵon kiam disaŭdiĝis optimisman prelegon de Regento Miklós Horthy pri la decido de la hungara registaro aliĝi al la Alianco kontraŭ la germanoj. Ho ve nia optimismo ekiĝis timo kaj angoro. La Sagkruca Partio estrata de la kontraŭ juda Szálasi superregis la registaron. Mi bezonis kaj ĝuis la promenadon al miaj geamikoj. Kiam la pordisto malfermis la pordon por mi, li mane krucsignis super sia brusto kaj ĝojis revidi min. Efektive ankaŭ li estis en danĝero ĉar li malfermas la pordojn por judo.

Post semajno la germanaj soldatoj ordonis nin iri al la grundetaĝo je la oka matene, portanta ĉion valorindan. Ni devis meti niajn ringojn en unu korbon, niajn brakhorloĝojn en alian, same

fontoplumojn, braceletojn, orelingojn kaj alian juvelaron. Postnelonge la germanoj pendigis novan ordonafiŝon sur la liftopordojn, informante ĉiujn judinojn ariĝi la sekvan matenon kaj marŝi al la Brika Fabriko por "elektati". La tutan nokton ni laboris tondante kaj disŝirante littukojn, kusenkovrilojn kaj bantukojn en striojn por fari dorsosakojn en kiu ni povos porti tiom multe kiom eble el niaj posedaĵoj. Nur unu sinjorino havis kudromaŝinon, kaj ŝi okupiĝis tutnokte.

Plano por eskapi

Mia haŭto estis plena je ŝvelaĵetoj, mia gorĝo kun buleto, mia hararo nuka piketis la haŭton. Mi panikis kaj decidis eskapi! Sed kiel? Mi refoje petis al la pordisto kaj lia edzino, kaj ankaŭ ili time tremetis. Ili diris ke ili bedaŭras, sed povas fari nenion. La sagkruculoj kaj germanaj soldatoj jam estras kaj okupas la konstruaĵon. La pordista paro estis tre decaj, sed konsciis pri ilia riska situacio, kun du adoleskaj filoj kaj belega filino, kiu estis populara laŭmoda modelulino. Ili estis ĉiam observataj. Mi neniam timis ion ajn kaj eksciis, ke nun estas la momento pruviti. Sed al kiu pruvi? Kompreneble al mi mem.

La postan matenon oni devigis nin aŭskulti prelegon, kaj marŝi el la malfermitaj pordegoj laŭ la belaj stratoj kaj avenuoj de Budapeŝto en la direkto de la brikfabriko. Mi tuj konsciis, ke spite la precizeco de la germanoj, ili ne eĉ nombris la inojn, kiuj devis kunmarŝi. Ĉi tiu fakto kuraĝigis min fari rapidan decidon. Iam poste mi diris al la virino apud mi, ke miaj botlaĉoj malligiĝis kaj mi devas halti kaj reveni poste. Mi turniĝis promenis al la fino de la vico, kaj kuris en proksiman konstruaĵon. Mi forprenis la botojn, sinvestis kiel lokanon portante fadensaketon kun peco de florbrasiko ene

de ĝi. Mi lasis miajn botojn kaj dorsosakon tie, surmetis sandalojn, turniĝis kaj promenis retroen laŭ la avenuoj, trans la ponton kaj supreniris Rozmonteton (Rózsadomb) al mia amikino Elli, kiu prilaboris hundejon. Dumvintre, mi kaj mia edzo kutimis ludi briĝon kun ŝi kaj ŝia edzo. Ŝi ne estis judo. Mi sentis, ke mi povis peti ŝin pri rifuĝo. Kiam ŝi vidis min, ŝi informis min, ke ŝi jam havis tri nejunajn judinojn loĝantajn ĉe ŝi. Ŝi petis min ekforiri, ĉar ŝi ne deziris, ke iu vidu nin kune.

Mi retroiris laŭ la mallarĝa vojo flankata de junaj germanaj soldatoj sur motorbikloj. Ĉiuj salutis min per afablaj frazoj, sed mi ne kuraĝis halti, evitante iujn konversaciojn kaj rapide formoviĝante. Mi iris al alia amiko proksime al la trajnstacio Keleti. Kiam li vidis min li enirigis min al alkovo en sia apartamento, malfermis ŝrankan pordon kie lia patrino kaŝis sin. Li diris, ke ŝi estas judo kvankam neniu scias. Mi sciis, ke estas nenia alia solvo ol iri hejmen. Kiam la pordisto vidis min li panikis. Li diris, ke la germanoj estas supre kaj rapide kaŝis min en la kelo kie la karbo stokiĝis por la centra hejtigilo. Mi survestis nur per somera robo kaj jam manĝis la florbrasikon. Sed jen mi estis kaj jen mi restis dum kiom da tempo mi ne scias. Povus esti tri tagoj kaj tri noktoj, sen manĝaĵo kaj varmaj vestoj. Karbopolvo kovris min, sed mi povis fari nenion. Estis malvarme, mallume kaj timige. Mi komencis sangadi, la sango fluanta ĉien. La edzino de la pordisto rimarkis la sangon, kiu fluis ĝis la koridoro kaj urĝe flustris, ke mi bezonas sanserviston. Nenia kuracisto rajtis kuraci judon. Ŝi diris al mi, iru al la tiel nomata juda hospitalo, kiu malfermiĝas dum duonhoru ĉiun tagon. Ĝi estis ĉe la Wesselény, konstruaĵo por la utca bazlernejo, kun tri etaĝoj kaj tre proksima.

Enirante la "hospitalon", mi renkontis dikan, cigarfumantan ulon ĉe la enirejo, kiu sinvestis per T-ĉemizo. Mi poste eltrovis, ke li estis Profesoro Benedek, ginekologo kaj dediĉata komunisto. Li tiam estris la "Judan Hospitalon". Li arogante demandis al mi, kion mi volas. Ankoraŭ retiriĝema, mi respondis, ke mi deziris rendevujon kun kuracisto. Li estis malafabla kaj diris, ke mi estas unu de tiuj, kiuj ne deziris esti en deviga laborejo, kaj tiel alvenas al la hospitalo. Li daŭris per insultaj vortoj kaj uzis eĉ vortaĉojn. Dum mi staris kaj atendis, li verŝajne rimarkis sangan fluantan laŭ miaj kruroj kaj tiam diris al mi iru al la tria etaĝo kaj atendu tie. Sur la tria etaĝo estis la lerneja gimnastikejo kun betonaj plankoj, altaj fenestregoj kaj ĝi estis tute malplena. Dum iom da tempo mi ĉirkaŭpaŝis, tiam sidiĝis sur la planko, kaj atendis, atendadis, sed neniu alvenis.

La edzino de la pordisto maltrankviliĝis,

ĉar mi ne revenis. La sekvan tagon ŝi alvenis al la "hospitalo" por trovi min. Kiam ŝi trovis min, mi petis al ŝi alporti parton de nia matraco el nia apartamento (ni havis matrakon en tri partoj trans nia lito), mian litkovrilon kaj kuseneton. Ĉar mi estas negranda, unu matrakan parton sufiĉis por mi.

La sekvan matenon ŝi revenis kun la matraco, litkovrilo kaj kuseneto. Ŝi rapide demetis ĉion kaj sen vorto forkuris. Ŝi riskis sian liberecon aŭ eĉ vivon, helpante judon. Fine mi havis ion sur kio mi povis dormi, sed ankoraŭ mi estis sen manĝaĵo aŭ akvo aŭ ion ajn, kaj tute sola. Mi atendis kuraciston aŭ flegiston, sed neniu alvenis. Mi surhavis nur someran robon, do nature estis malvarma kaj malsata. Mi sciis, ke la judoj rajtis eliri inter la 11a kaj meztago por butikumi. Venontan tagon je la 11a mi ŝtele eliris kaj kuris al mia apartamento, kiu estis nur for post 5 minuta kurado. **E**



Deportado de judoj en la VII-a distrikto, Budapeŝto, 1944

Saneca Salono kun MEA en Torquay

MARUMI SMITH (TORQUAY, VIKTORIO)

La komunuma evento, serio de Saneca Salono, okazis en Torquay Viktorio je la 20a de Oktobro 2024 kun Melburna Esperanto Klubo ĉe la domo de progresantoj Gary kaj Marumi Smith. Pli ol 20 lokaj partoprenantoj ĝuis la prelegojn pri 'Vivo post fizika morto', temo traktante la pensojn pri "transcendado".

Transpersona psikologo, Mel Osborne el Geelong, kiu laboras pri la studa projekto "Shared Crossing" (Kuna Transirado)

centrigitajn funebraĵojn (averaĝa kosto por funebraĵo en Aŭstralio estas \$10 000 kontraŭ \$3 000 de Tender Funerals).

Heather Heldzingen de AEA rakontis pri sia bona kaj riĉa sperto en esperantujo. Humure, ŝi alparolis pri sia romantika kaj elektra renkontiĝo kun sia estonta edzo Ivan Heldzingen kiam ŝi ĵus komencis labori je la aĝo de 16 jaroj en Melburno. Ŝi parolis ankaŭ pri la UEA kongreso en Tanzanio, Afriko en julio 2024, kiel freŝa novaĵo.



esploris mortospertojn bazite de intervjuoj de pli ol 5000 homoj (homoj, kiuj spertis la morton kaj reviviĝis, aŭ la prizorgantoj de tiuj) en Okcidentaj landoj. Misio de la projekto estas "pozitive transformi rilatojn al morto per edukado kaj konscio, pri 'Shared Crossing' kaj ties resanigaj avantaĝoj." Usona hospica psikologo kaj esploristo William Peters estas la fondinto de la projekto.

Mel enkondukis alian projekton, "Tender Funerals" (Teneraj Funebraĵoj) komunuman iniciaton, kiu konscie organizas malpli kostajn kaj hom-

Dum tagmanĝo, esperantistoj uzis la lingvon kun la lokaj partoprenantoj kiel eble plej multe. Bonega okazo por distribui la broŝurojn, kiujn Joanne Johns rekreis frue pasintan jaron.

Post la morto de Doktoro Zamenhof, lia densigita entropia energio, kaj liaj celoj certe kaj forte vivas kaj influas la Teron pozitive. 

Memoroj pri Ralph Harry

PETRO DANZER (BRISBANO)

La unuan fojon kiam mi renkontis Ralph Harry, estis en la oficejo de la Kanbera Radiostacio 2XX ĉirkaŭ 1984.

Li estis tie por fari radiointervjuon pri Esperanto kaj mi estis tie kun du aliaj Baha'anoj por fari intervjuon pri la Baha'a Kredo. Kelkajn monatojn poste proksimume ok Kanberaj Baha'anoj estis invititaj ricevi lecionojn pri Esperanto ĉe la hejmo de Gesinjoroj Harry en la antaŭurbo, Forrest. Post iom da tempo ni renkontiĝis en la Kanbera Griffin-Centro kaj mi kontaktiĝis kun eminenta esperantistino Marjorie Ellyard, kiu fariĝis mia ĉefa instruisto, kaj por ankaŭ la multaj aliaj esperantistoj.

Unu el la kulminoj de mia frua vivo kiel ekkreska esperantisto estis la vizito al la Sidneja Esperanto-Societo. S-ro Harry organizis Esperantan demandaron,

inter multaj aliaj aferoj, kaj jen mi gajnis trofeon.

Alia memorinda tago okazis post iom da jaroj, kiam Ralph Harry ŝoforis min al la Esperanto-Biblioteko de AEA en Deakin. Li ankaŭ invitis la Ĝeneralan Guberniestron, Sir Ninian Stephen kaj lian edzinon por spekti la elmontraĵon.

Ĉar mi plenaĝiĝis kun la verkoj de Friedrich von Schiller, la rakonton en la libro de S-ro Harry, *La Diplomato kiu ridis*, mi trovis aparte amuza.

Nur antaŭnelonge mi eksciis, ke S-ro Harry persvadis UN-on kaj NASA-on akcepti Esperantan mesaĝon de paco, kune kun tiuj en 54 aliaj lingvoj. Tiuj gravuriĝis sur orajn sondiskojn alfiksitaĵn sur Voyager 1 kaj 2, esperante ke iu el la 2 sondiskoj iam kontaktiĝos kun ekstertera inteligenta vivo. **E**



Ralph Harry kun la aŭstralia Ĝenerala Guberniestro, Sir Ninian Stephen kaj lia edzino, ĉe la Aŭstralia Esperanto-Biblioteko

Pli gravaj problemoj en la ĉefurbo

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

Dum la somera kurso en Adelajdo en januaro mi prelegis pri diversaj problemoj en Wellington, ĉefurbo de Nov-Zelando: perdo de loĝantaro, altaj vivkostoj, ekonomia krizo, maldungoj, malaltaj domprezoj, nekapabla loka magistrato (urba registaro), kaj tro da biciklovojoj. Nun ni devas aldoni novan gravan problemon: perdo de politika influo.

La registara komisiono, kiu respondecas pri elektoj, anoncis en marto ke Wellington perdos unu elekta distrikton. Nun estas tri distriktoj en la ĉefurbo sed por la venontjara nacia baloto Wellington havos nur du el 64 distriktoj en la lando (kvankam, laŭ nia iom komplika elekta sistemo, estos 120 deputitoj (proksimume) ĉar kelkaj deputitoj elektiĝos en siaj distriktoj kaj aliaj eniros Parlamenton pere de partiaj listoj.

Kial okazas ĉi tiu perdo de distrikto? Estas pro la fakto ke la loĝantaro de Wellington plimalmultiĝas. Ĉiu elekta distrikto devas havi pli-malpli 70 000 voĉdonantojn sed, pro perdo de enloĝantoj dum la kvin jaroj antaŭ la popolnombro

en 2023, la urba loĝantaro nun ne plu sufiĉas por tri distriktoj.

Kiel mi menciis dum mia prelego, multaj homoj dubas, ĉu nia nuna urbestrino estas kapabla. Surprize, ŝi anoncis, ke ŝi rekandidatiĝos nome de la Verda Partio en la loka baloto, kiu okazos ĉi-jare en oktobro. En la pasinta semajno, bone konata eksa deputito en la nacia Parlamento/estro de la Laborista Partio kiu loĝas en Wellington sciigis, ke ankaŭ li prezentos sin, kaj estas ankaŭ dekstrulaj kandidatoj. Tial, ne estas certe, ĉu nia urbestrino ree elektiĝos.

Ĝisdatigo: nur 2–3 tagojn post kiam mi verkis ĉi tiun artikolon, Tory Whanau anoncis, ke ŝi ne plu kandidatiĝos por la urbestra posteno sed nur por esti magistratano (ne urbestrino). Ŝi faras tion por helpi al Andrew Little kontraŭ maldekstra(j) kandidato(j).

Ekde multaj jaroj Wellington perdas influon en nia nacia vivo. Auckland estas sendube la plej grava komerca urbo kaj celurbo por plejmultaj enmigrantoj. Nun ironie nia politika ĉefurbo perdas politikan influon. 



Haveno Wellington

Insuloj pelas lingvan diversecon

DONALD ROGERS (WELLINGTON, N-Z)

Insuloj generas lingvan diversecon. Grupo de sciencistoj ĉe la Aŭstralia Nacia Universitato (ANU) analizis statistikojn pri la lingvoj de 13000 priloĝataj insuloj en la mondo. Kvankam insuloj havas nur etan proporcion de la tersurfaco, insuloj signife influas la biosferon kaj klare montras la efikojn de biologia evoluado. La Galapagoj estas konata ekzemplo, kiu inspiris al Charles Darwin elpensi sian teorion pri natura selektado. La ANU-biologoj trovis, ke insuloj ludas similan rolon pri la homaj lingvoj, kaŭzante ŝanĝojn kaj diversecon. Ili trovis ke ĉirkaŭ 20% de la lingvoj parolatas sur insuloj, malgraŭ ke insuloj kovras nur 1% de la tera surfaco.

La esploristoj rimarkis, ke la nombro da insulaj, endemiaj lingvoj pliiĝas kun la grandeco de insuloj kaj kun distanco for de grandaj landamasoj. Tio sugestas ke longaj distancoj de grandaj landoj ebligas al insuloj evolui sendepende kaj evoluigi apartajn trajtojn. Se ni konsideras la ĉeflandon de Aŭstralio grandega insulo, ne estas surprize ke, post dekmiloj da jaroj da izoleco de aliaj landoj, ĝi havas centojn da indiĝenaj lingvoj.

Ĉirkaŭ 10% da mondaj lingvoj estas endemiaj al insuloj, uzataj nur aŭ ĉefe sur insuloj. Insulaj lingvoj emas havi malpliajn fonemojn (bazajn sonojn), el kiuj oni konstruas vortojn. Ekzemple, la pukapuka lingvo, kiu estas indiĝena al izolita samnoma insulo de la Kukinsuloj, havas nur dek konsonantojn kaj tri el ili ŝajne ne ekzistas en aliaj polineziaj lingvoj. La havaja lingvo, ankaŭ polinezia lingvo, havas nur ok konsonantojn kaj unu el ili estas glota halto, kiel en la vorto Hawai'i.

Estas konate pro pli fruaj studoj, ke tutgloba diverseco de lingvoj aktuale

suferas krizan perdon same severa kiel la minaco al biodiverseco. Unu triono de la lingvoj en la mondo estas minacataj kaj eble 1500 perdiĝos antaŭ la fino de la 21a jarcento. La ANU-teamo taksas, ke la insulaj lingvoj ne estas en pli granda danĝero ol la lingvoj de kontinentoj.

Ĉar insuloj tenas grandan parton de tutgloba disverseco, ili grave rolas en la konservado de lingva diverseco.

La ĥajda lingvo de la insularo Haida Gwaii de okcidenta Kanado, estas en granda danĝero. Kiam koloniistoj alvenis en 1774 ĝi havis ĉirkaŭ 15000 parolantojn. Laŭ Vikipedio, ĝi nun havas nur 24. La ĥajda lingvo havas multajn kompleksajn konsonantojn kaj tonojn, kaj kompleksan gramatikon.

La ANU-biologoj konkludis, ke studi insulajn lingvojn povas inspiri komprenon de la evoluaj procedoj, kiuj muldas lingvojn, simile al kiel okazas la evoluado de biologio. Multaj insulaj lingvoj estas minacataj. Kompreni la rolon de insuloj povas informi strebojn konservi minoritatajn lingvojn.

Referencoj

Lindell Bromham, Keaghan J. Yazley, Marcel Cardillo, "Islands are engines of language diversity", *Nature Ecology and Evolution* 8, 1991-2002 (2024)

wikipedia.com por la ekzemploj pri lingvaj karakteroj. 



Promenado en bela adelajda kvartalo

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En januaro de 2025 mi ĉeestis la kongreson de la Aŭstralia Esperanto-Asocio en norda Adelajdo. Mi trovis kun granda ĝojo ke la manĝaĵoj estas ege bongustaj. Bonŝance la kongresejo (St Ann's College) troviĝis en malnova kvartalo kun interesa miksaĵo de belaj kaj historiaj domoj plejparte el la 19-a jarcento.

Apud la kongresejo estis Stanley Street, trankvila strato kun grandaj arboj ambaŭflanke. En la strato troviĝas katolika preĝejo kies unua parto konstruiĝis en 1877. La preĝejo nun estas la tria plej malnova katolika preĝejo en Adelajdo. Kiam oni konstruis la preĝejon ĝi situis en tiam nomata "Irishtown" (kvartalo de irlandanoj). Tie loĝis laboristoj kaj

metiistoj en dometoj kun malgrandaj ĝardenoj, konforme al plano de Edward Gibbon Wakefield (kiu rolis ankaŭ en la fondiĝo de kelkaj urboj en Nov-Zelando) kiu celis krei dividon inter riĉaj kaj malriĉaj klasoj.

Kontraste, je la alia flanko de la strato (pli precize en Brougham Place), oni konstruis por riĉuloj grandajn domegojn kun grandaj ĝardenoj kaj, pro eta deklivo, vidoj al la urbo. Pro tio, la strato estas interesa pro ĝiaj ĉarmaj dometoj por malriĉuloj nuntempe plejparte renovigitaj kaj altvaloraj kaj, kontraste, imponaj kaj eĉ pli multekostaj domegoj por riĉuloj. Se vi interesiĝas pri arkitekturo, mi rekomendas viziton al Stanley Street kaj apudaj stratoj.



Unu el la plej malnovaj domoj en la kvartalo, konstruita en 1854



Domoj konstruitaj de bonfara asocio por vidvinoj kaj aliaj malriĉuloj



Je la alia flanko de la strato, domego por riĉulo



Katolika preĝejo



Anglikana lernejo konstruita en 1894

El la regionoj

KVINSLANDO

Brisbana Esperanto Societo

Laŭvole kunvenas proksimume ĉiun duan semajnon foje ĉe la hejmo de Doug Eising aŭ en kafejo. Plej bone konfirmi ĉe Doug. eising@ozonline.com.au

Unu- aŭ dufoje en la jaro la kunveno okazas en la hejmo de Petro Danzer en Caboolture, kie membroj havas oportunojn tririgardi la Esperanto-bibliotekon.

– P. Danzer

NOVA SUD-KIMRIO

EFNSW: Esperanto-Domo

143 Lawson St, Redfern 2016

Tel. (02) 9319 4775;

Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00

Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

www.instagram.com/esperanto_nsw

www.facebook.com/EsperantoNSW

esperantohouse.org.au

nsw@esperanto.org.au

Manlia Esperanto-Klubo

Kunvenas kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno 1an kaj 3an sabatojn

de la monato, 10:00. Komencantoj estas bonvenaj. Kontaktu Roger (02) 9976 6320 manly@esperanto.org.au

Esperanto-Klubo de la Centra Marbordo

Kunvenas la 3an dimanĉon de la monato, 12:00, ĉe Waterfall Cafe, Karing. Kontaktu Joanne 0413 087 340 centralcoast@esperanto.org.au

Novkastelanoj

Kontaktu Andrew (02) 4951 2084

newcastle@esperanto.org.au

Suda Marborda Grupo

Malgranda grupo kunvenas foje en Bega. Komencantoj bonvenaj. Kontaktu Penny Vos (02) 6495 2922

– T. Manley

SUD-AŬSTRALIO

La ĉi-jaran AEA-kongreson kaj somerkursaron partoprenis (en diversaj gradoj) 13 sudaŭstraliaj esperantistoj. Dank' al Sandor Horvath la 13an de januaro Radio Adelaide elsendis proksimume duonhoran intervjuon kun kvin partoprenantoj de la evento.



Esperanto-Domo, Redfern (Sidnejo)

Januare forpasis Elizabeth Mortimer, multjara membro de nia klubo. Kvar esperantistoj ĉeestis la rememoran ceremonion en Port Adelaide.

Fine de februaro ni havis jarkunvenon. Ni registras 17 esperantistojn. La prezidanto de la klubo restas Trevor Steele. Sub lia gvido daŭrigas kunlegadon (Zoom-e) la 5 membroj de la loka legogrupo.

Laŭplane la unua kluba kunveno devis okazi ĉeeste en la Ŝtata Biblioteko, sed pro malsanoj ĝi estis nuligita. Anstataŭe ni ree kunvenis per Zoom kaj Katja Steele prezentis prelegecon pri Komenio.

La 16an de marto okazis ekskurso al la nacia fervoja muzeo en Port Adelaide. Gvidite de Helen Palmer sep esperantistoj pasigis agrablajn horojn inter la malnovaj lokomotivoj, vagonoj, ekspoziciaĵoj kaj havis eĉ etan trajnveturon en turisma trajneto.

La aprila klubkunveno de la adelajdanoj okazis en la urbocentro de Adelajdo, en la ĉefa biblioteko. Post longa tempo ni finfine kuniĝis persone, ne per la reto. Surprize, aldoniĝis al ni du novuloj: Louise Moriaty, amikino de Helen Palmer el Wilcania (kelkaj el vi renkontis ŝin dum la januara somerkursaro), kaj Asty Prastyani, alia loka konatino de Helen. La tria surprizo estis juna studento, ŝajne hazarda vizitanto al la biblioteko, kiu eniris por kelkaj minutoj por aŭskulti nin.

Ankaŭ la prelegon de la tago preparis

Helen – pri lakto. Per grafikajoj kaj diversaj datenoj ŝi analizis kelkajn specojn de lakto (bovinan, rizan, avenan...) kaj kiom da sukero ili enhavas, kiom da akvo necesas por ilia preparo, kaj kiom ilia produktado influas la homan korpon kaj la planedon.

Por ne neglekti la evoluon de nia Esperanto-konoj, Trevor igis nin pripensi lingvajn demandojn kaj ludojn.

Al nia gaje kafumanta grupo sur la teretaĝo de la biblioteko aldoniĝis la kvara surprizo: Giselle Robin, kiu lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj kun Trevor.

Ĉar la biblioteko ĵus havis ekspozicion pri la HOLDEN-aŭtoproduktado, ni eternigis la belan antaŭtagmezon per foto ĉe la sprita ekspoziciaĵo.

– K. Steele

VIKTORIO

Melburna Esperanto-Societo

Melburna Esperanto-Societo povos kunveni ĉe propra oficejo ekde junio 2025. La adreso estas Ĉambro 304, 3a etaĝo, 343 Lt. Collins Strato, Melburno



Ekspozicion pri la HOLDEN, Adelajdo

(vidu la foton). La Asocio multe dankas al Heather Heldzingen, Joanne Johns, AEA kaj la Esperanto-Federacio de NSK, kiuj daŭre kaj klopode subtenis la planon por ĉi tiu mirinda projekto. La E-junuloj de MEA, William, Brendan, Bradley, Nicolas kaj Darcey helpis ordigi la novan oficejon je la 25a de Aprilo kun membroj de la komitato.

– M. Smith

3ZZZ

Mi havas la plezuron anonci ke NEMBC (National Ethnic and Multicultural Broadcasters' Council) nomumis Brendan Price kiel la junulon de la jaro 2025 en la radio 3ZZZ. Gratulon al li kaj fruktodonan estonton en la radio.

Pro sia intereso al Esperanto, Brendan demandis ĉu ni akceptas, ke li faru sian eksperimentan periodon, kiu estas parto de lia magistrecio en internaciaj rilatoj en la universitato LaTrobe, kun nia grupo el 3ZZZ. Ni entuziasme akceptis lin kaj pasintan oktobron li ekĉeestis niajn programojn. Paralele, li sekvis la kurson de Eŭgene O'Rourke por havi la rajton elsendi programon en 3ZZZ kaj regule vizitis Melburnan Esperanto-Asociacion por plibonigi sian konon de la lingvo. En



januaro li ĉeestis la somerkursaron en Adelajdo kaj plu studis Esperanton kun Hoan Tràn. Li planas ĉeesti la Junularan Esperanto-Kongreson en Bogor en aŭgusto 2025.

Estas plezuro konstati liajn progresojn, memfidon kaj lian pretecon plibonigi kaj siajn konojn kaj nian programon.

La 17an de februaro 2025 Rainer Kurz, kiu kutimas pasigi plurajn monatojn en Aŭstralio ĉiun jaron, venis al la studio de 3ZZZ en Melburno. Franciska Toubale intervjuis lin pri lia laboro kaj la politika situacio en Germanio ĵus antaŭ la baloto. Se vi volas aŭdi la intervjuon iru al la retejo melburno.org.au/3ZZZradio.

– F. Toubale 📺



De la maldekstro dekstren: Heather Heldzingen, Brendan Price kaj Rainer Kurz

KONTRIBUU al **ESPERANTO** sub la suda kruco



Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo Helen Palmer

4–7 Helen Palmer / Sandor Horvath

6 KAVA-PECH

9, 10 TEJO

11 (1–3) Art Gallery of NSW

12 (4, 5) Art Gallery of NSW

(6) National Gallery, Londono

13 (7) Musee Unterlinden, Colmar, Francio

(8) Uffizi, Florenco (9) Louvre, Parizo

14 (10) Louvre, Parizo (11) Prado, Madrido

(12) Kunsthalle Hamburgo

(13, 14) Musée d'Orsay, Parizo

15 (15) National Gallery, Londono +

Metropolitan Museum of Art, Nov-Jorko

(16) Santa Maria delle Grazie, Milano +

Basilica di San Giorgio Maggiore, Venecio

(17) Hans Namuth Estate, per Wikimedia Commons

16, 17 (18–21) Art Gallery of NSW

18 Jonathan Cooper

19 Pix By Ash, per Flickr

20 Flandra Esperanto-Ligo

23 Fortepan, Hungario

24 Marumi Smith

25 Petro Danzer

26 David Ryan

27 Hansueli Krapf, per Wikimedia Commons

28–30 David Ryan

31 Jonathan Cooper

32 Katarina Steele

33 MEA: Joanne Johns;

3ZZZ: Franciska Toubale

36 Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

William Georgeson, Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**

Committee Members:

Dave Dewar, Stephen Epstein, Georgia Naish,
Lorraine Wong

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

“Esperanto?”

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

